

UNIVERSITATO EÖTVÖS LORÁND  
FILOLOGISCIENCA FAKULTATO  
Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko  
Fako Esperantolingvo kaj literaturo

ESPERANTOLOGIAJ  
KAJEROJ 1.

Redaktita de  
d-ro István Szerdahelyi

Budapest, 1976

---

La prepozicia sistemo de  
Esperanto

---

/Fabrizio Angelo Pennacchietti/

1. Prepozicio kaj aliaj rilatindikiloj

Esperanto, samkiel relative malmultaj lingvoj, pleje apartenantaj al la hindoeŭropa kaj hamidosemida lingvo-grupoj, posedas la gramatikan kategorion de prepozicio.

Prepozicio, kiel konate, estas nevaria vortspeco aŭ morfemo, kiu, metite antaŭ substantivo, antaŭ pronomo aŭ eĉ antaŭ infinitivo kaj la eventualaj respektivaj epitetoj kaj komplementoj, rilatigas tiun parolelementon al alia substantivo, al verbo, adjektivo aŭ adverbo.

La rolo, kiun ludas la prepozicioj en Esperanto, po--

vas esti plenumata en aliaj lingvoj kaj eĉ interne de Esperanto de aliaj diversspecaj morfemoj: a/ de adjektivaj aŭ adverbaj finaĵoj /la vilaĝaj domoj = la domoj de la vilaĝo; somere li feriadis = dum la somero li feriadis;/ b/ de deklinaciaj kazoj /ĉies propraĵo = propraĵo de ĉiuj; veni la postan tagon = veni en la posta tago;/ c/ de postpozicioj; c/ de specialaj situvortoj /plejofte vizaĝo, frunto, kapo, supro, brusto, dorso, ventro, koro, flanko, pordo, tero k.t.p., tiamaniere ke en pluraj lingvoj vilaĝo-ventre, festo-dorse, domo-porde, arbo-tere respondas respektive al en la vilaĝo, post la festo, ekster la domo, sub la arbo;/ aŭ d/ de specialaj subordigitaj verboj /ekz. okupi, lasi, atingi, uzi, egali, superi, akompani k.t.p., tiel ke en kelkaj lingvoj mi legas okupas ĉambron, mi veturis lasis landlimon, mi donacos libron atingos amikon, la frato grandas superas la fratino respondas respektive al mi legas en ĉambro, mi veturis de la landlimo, mi donacos libron al amiko, mi skribas per kraĵono, la frato estas pli granda ol la fratino/.

Kompare kun la ĵus menciitaj rimedoj, kiujn pluraj lingvoj posedas por rilatigi substantivon al aliaj parol-elementoj, la prepozicioj havas tamen la privilegion, kundividitan eble nur kun la postpozicioj, esprimi en la plej analiza, ekonomia kaj elasta maniero tian interrilaton. Tio dependas de la fakto, ke la prepozicioj ŝajnas esti aranĝitaj laŭ sufiĉe stabila kaj kohera sistemo de funkciaj kontraŭstaroj, en kies reto nia lingva kompetenteco permesas al ni facile elekti la plej taŭgan morfemon por la esprimota interrilato. Kiel artikigas tiu ĉi sistemo, kia estas ĝia strukturo, dank' al kia "meĥanismo" ni kapablas orientiĝi en ĝia komplekseco estas la demandoj al kiuj ni provos respondi en tiuj paĝoj.

La prepozicioj de Esperanto estas senkompare multnombraj, minimume 34 unuoj, kaj ŝajnas ordigitaj laŭ sistemo, kiu nur supraĵe similas al tiuj de aliaj prepozicihavaĵaj lingvoj. Fakte, tre malofte okazas, ke prepozicia sistemo

de iu lingvo plene koincidas kun tiu de alia lingvo.

## 2. Kriterioj por determini prepozicisistemon

Kvankam ĝi montras apartan karakteron, la prepozicia sistemo de Esperanto baziĝas sur la samaj principoj de aliaj prepozicisistemoj, kaj, ĉar la prepozicio estas nur unu el la diversaj tipoj de morfemoj, per kiuj oni kunligas frazelementojn, prepozicisistemo devas nepre obei al la samaj leĝoj de ĉiu alia sistemo de rilatindikiloj. Tio signifas, ke la interna strukturo de iu ajn prepozicia sistemo kohere enkadriĝas en la ĝeneralaj principoj, kiuj regas aliajn procedojn por interrilatigi vortojn aŭ prepoziciojn.

Teorie ekzistas do intima interrespondeco inter la rilato starigita de prepozicio kaj la rilatoj subjekto-predikato, subjekto-objekto, subjekto-predikativo, adjektivo-substantivo, substantivo-rilativpropozicio, adverbo-verbo, adverbo-adjektivo, ĉefpropozicio-subpropozicio k.t.p.

Sekve, nur gramatika teorio, kiu kapablas klarigi en unueca kaj eksplicita /t.e. formalizebla/ maniero la komunajn trajtojn de tiel malsimilaj rilatoj, povas alfronti la taskon analizi la strukturon de prepozicia sistemo kaj konsekvence klasifiki ĉiun unuopan prepozicion.

### 2.1. Korelacio kaj korelaciindikiloj

Teorio, kiu havas bonajn ŝancojn en la tasko malkaŝi la relativan pozicion, kiun prepozicio okupas en sistemo, estas laŭ ni la tiel nomata "korelacia gramatiko". Ĝi fondiĝas sur la tezo, ke ĉiu funkcia rilato, kiu interligas du frazelementojn aŭ du kombinojn de frazelementoj, respegulas semantikan konceptan unuon nomatan "korelacio".

Korelacio konsistas ĉiam el la interarango de du termoj, kiuj respondas al semantike jam strukturitaj ideoj, kiel ekzemple la ideoj de soifo, paco k. t. p. La naturon de

tia interarango signalas sur la lingva nivelo apartaj morfologiaj aŭ sintagmaj indikiloj, kiujn oni nomas korelaci-indikiloj.

Inter la du termoj de korelacio oni distingas komencan /K-/ termon kaj finan /F-/ termon. Ekzemple, la segmenton soifo je paco oni povas konsideri kiel la lingvan projekcion de semantika koncepta korelacio, kie la ideo de la determinato soifo rolas kiel K-termo kaj la ideo de la komplemento paco rolas kiel F-termo. Memkompreneble la prepozicio je funkcias kiel korelaciindikilo. Ĝi respegulas la specifan tipon de korelacio, kiun oni konceptis inter la ideo soifo kaj la ideo paco, samkiel la vortoj soifo kaj paco respegulas la koncernajn ideojn.

La tasko, kiun plenumas la korelaciindikilo inter la vortoj respondantaj al du korelaciaj termoj, estas triobla: 1/ unue, ĝi markas tiun el la du termoj, kiu rolas kiel F-termo; 2/ due, ĝi plenumas funkcion iasencé similan al tiu de la matematikaj signoj por adicio, subtraho, multipliko aŭ divido: nome, la korelaciindikilo informas eksplícite pri la tipo de mensa operacio, kiun la parolanto/skribanto proponas al la aŭskultanto/leganto por korekte rekonstrui certan semantikan unuon el la specifa signifo de la du donitaj termoj; ĉar ekzistas pluraj klasoj de korelacioj, la korelaciindikilo signalas do la celitan klason; 3/ trie, interne de la korelacia klaso tiamaniere determinita, la korelaciindikilo precizigas la specifan sintaksan rilaton de la du termoj.

## 2.2. Unua fundamenta mensoperacio


Unu el la fundamentaj tipoj de mensoperacio, kiun la prepozicio aŭ alia korelaciindikilo stimulas en la aŭskultanto/leganto, koncernas la reciprokan sintaksan kaj semantikan orientigon de la du termoj de la korelacio. Nu, ĉar la korelaciindikilo markas ĉiam la F-termon, ĝi informas, ĉu la semantika enhavo de la F-termo aplikigas

al la K-termo aŭ kontraŭe, ĉu la K-termo aplikigas al la semantika enhavo de la F-termo.


Ni imagu, ke mesaĝo aŭ parto de mesaĝo al ni submetita entenas la du radikalojn URĜ- kaj INSTIG-, pri kiuj ni scias, ke ili formas ian korelacion, sed ni ne konas la naturon de ilia sintaksa interligo. Sen helpo de korelaciindikilo ni troviĝas en granda embaraso por interpreti la celitan sencon de la masaĝo: unue, ĉar ni ne scias, kiun el la du termoj oni mense planis kiel K-termon; due, ĉar ni ne scias, kiu el ili du aplikigas al kiu. Ni fakte havas antaŭ ni almenaŭ kvar bazajn solvojn: paron de propozicioj kiel urgó instigas kaj instigo urgás, kaj paron de substantivaj sintagmoj kiel urĝa instigo kaj instiga urgó.

A/ En Esperanto, enkondukante la korelaciindikilon -A kaj ĝin-sufiksante al la semantemo URĜ-, ni rezultigas la korelacion urĝa instigo /adjektivo-substantivo/. Tiamaniere la semantemo URĜ- klasifikiĝas kiel F-termo de korelacio en la funkcio de adjektivo, kaj aŭtomate la semantemo INSTIG- akiras kiel K-termo la funkcion de substantivo. Per la korelaciindikilo -A alternativa solvo ja ne estas ebla. Laŭstatute la gramatika kategorio de adjektivo estas ĉiam orientita al substantivo. Sufiĉas, ke ni marku termon per -A, por ke la dua termo aŭtomate markiĝu per -O.

Se ni volas prezenti sub formo de bildo la tipon de korelacio, kiun respegulas urĝa instigo, ni povas simboligi la K-termon per t r i a n g u l o , la F-termon per c i r k l o kaj la sencon de la sintaksa orientigo aŭ aplikigo per s a g e t o . Tiam ekestos la jene formaliza diagramo:




B/ Enkondukante la korelaciindikilon -AS kaj ĝin al la semantemo URĜ-, ni rezultigas kontraŭe la korelacion instigo urĝas /subjekto-verba predikato/:




Ĉi tie la semantemo URĜ- klasifikigas kiel F-termo en la funkcio de verba predikato kaj aŭtomate la semantemo INSTIG-, ankoraŭfoje en la rolo de K-termo, akiras nun la funkcion de subjekta substantivo. La korelaciindikilo -AS postulas nur tiun ĉi eblecon. Laŭ sia statuso, fakte, la gramatika kategorio de verbo necesigas la ekziston de subjekto orientita al ĝi. La subjekto, nome, aplikigas al la semantika enhavo de la verbo. La K-termo INSTIG- ja ne povus funkcii kiel objekto: unue, ĉar objekto estas ĉiam F-termo de korelacio; due, ĉar objekto postulas la ekziston de subjekthava verbo, t.e. de finitiva verboformo.

Ĉiukaze, kaj subjekto kaj objekto estas per si mem sintakse orientitaj al la koncerna verbo, kiu fakte konsistigas la kernon de la propozicio. Tial, propozicio entenanta objekton kiel instigo urĝas pigrulojn povas esti formalizita per la jena strukturo:




La korelaciindikilo -AS koncernas la supran korelacion /subjekto-verba predikato/kaj la korelaciindikilo -N rilatas al la subinsertita korelacio /subjekthava verbo-objekto/. La subjekto do aplikigas al la semantika enhavo de la verbo mem aplikigas la semantika enhavo de la objekto.

C/ Denove enkondukante la korelaciindikilon -A, sed ĝin sufiksante al la semantemo INSTIG-, oni nun rezultigas la korelacion instiga urĝo /adjektivo-substantivo/:



Ĉifoje la roloj sangiĝis. La semantemo INSTIG-fariĝas F-termo de korelacio kaj aŭtomate la semantemo URĜ- transformiĝas en K-termon kaj substantivon. La korelaciindikilo -A signalas, ke la semantika enhavo de INSTIG- aplikigas epitete al la K-termo URĜ-.

D/ Fine, sufiksante la korelaciindikilon -AS al la semantemo INSTIG-, oni rezultigas la korelacion urĝo instigas /subjekto-verba predikato/:



Ĉifoje la korelaciindikilo -AS signalas, ke al la semantika enhavo de INSTIG- aplikigas subjekte la K-termo URĜ-.

### 2.2.1. Aplikaĵaj korelacioj kaj retroaplikaĵaj korelacioj

Per la supre montritaj ekzemploj kaj formalizaj strukturoj ni provis doni ideon pri la mensoperacio, per

kiu oni determinas, dank<sup>o</sup> al korelaciindikilo, la reciprokan sintaksan kaj semantikan orientigon de la du termoj de korelacio.

Oni facile rimarkas, ke ekzistas du klasoj de korelacioj /kaj sekve de korelaciindikiloj/:

- a/ la korelacioj, en kiuj la K-termo aplikigas al la semantika enhavo de la F-termo, ekzemple la korelacio subjekto-verba predikato: vidu diagramojn /2/ kaj/5/;
- b/ la korelacioj, en kiuj la semantika enhavo de la F-termo aplikigas al la K-termo, ekzemple la korelacio adjektivo-substantivo kaj la korelacio verbo-objekto: vidu diagramojn /1/, /3/ kaj/4/.

Ni nomas la korelaciojn de la unua klaso aplikaj korelacioj kaj la korelaciojn de la dua klaso retroaplikaj korelacioj. Konsekvence, la korelaciindikiloj koncernantaj la unuan klason nomiĝos aplikaj korelaciindikiloj kaj tiuj, kiuj koncernas la duan klason, nomiĝos retroaplikaj korelaciindikiloj.

### 2.3. Dua fundamenta mensoperacio

Krom

informi pri la reciproka sintaksa kaj semantika orientigo de la du korelaciaj termoj, la prepozicioj kaj aliaj korelaciindikiloj havas ankaŭ la taskon sciigi, ĉu la F-termo troviĝas en paralela rilato kun la K-termo, aŭ male, ĉu ĝi troviĝas en koincida rilato kun la K-termo.

Tio estas la dua fundamenta tipo de mensoperacio, kiun la parolanto/skribanto proponas pere de la korelaciindikilo al la aŭskultanto/leganto, por ke li taŭge rekonstruu certan semantikan unuon surbaze de la specifa signifo de la du termoj.


Nu, rilate al la K-termo la F-termo povas esti perceptata aŭ 1/ kiel elemento paralela kun ĝi, t. e. semantike memstara kontraŭparto, kiu plene kontrastas kun la K-termo, aŭ 2/ kiel unupunkte koincidanta elemento, kiu funkcias kvazaŭ orientada gvidmarko aŭ referencaĵo.

Por distingi inter la paralela rilato kaj la koincida rilato povas utili komparo inter la du jenaj frazoj: a/ mi laboras EN mia hejmo, b/ mi laboras hejme. En la unua frazo la prepozicio en informas, ke la F-termo mia hejmo troviĝas en paralela rilato kun la K-termo mi laboras. Alivorte, en indikas, ke mia hejmo troviĝas konkrete en la sama tempo-spaca sfero de mia laboro; plie ĝi precizigas, ke mia laboro okazas interne de mia hejmo. Male, en la dua frazo la adverba finaĵo -e informas, ke la F-termo /mia/ hejmo troviĝas en pure koincida rilato kun la K-termo mi laboras: ĝi tute ne klarigas, ĉu mia laboro okazas interne de mia hejmo aŭ en ĝia proksima ekstereco, nome sur la verando aŭ en mia ĝardeno. Fakte la morfemo -e limigas je la informo, ke ekzistas unupunkta koincido de mia laboro kun mia hejmo. La F-termo tial aperas ne en sia konkreta aspekto de dimensihava objekto, sed simple kiel orientigpunkto preskaŭ sendimensia.

#### 2.3.1. Paralelaj korelacioj kaj koincidaj korelacioj

Paralelaj korelacioj ni nomas la korelaciojn, en kiuj morfemo indikas la ekziston de paralela rilato inter la du termoj; koincidaj korelacioj ni nomas iliavice la korelaciojn, en kiuj morfemo indikas la ekziston de koincida rilato.

Sendepende de la efektiva sintagma aranĝo de la koncernaj vortoj en la frazo, ni simboligas la paralelajn korelaciojn per la jena formulo:



La triangulo /K-termo/ situas ciam maldekstre de la cirklo /F-termo/. Al paralelaj aplikkorelacioj respondas do la formulo △ → ○, kaj al paralelaj retroaplikkorelacioj respondas la formulo △ ← ○


La koincidajn korelaciojn, denove sendepende de la efektiva sintagma aranĝo de la koncernaj vortoj en la frazo, ni simboligos male per la formulo  $\bigcirc - \triangle$

La triangulo ĉifoje situas dekstre de la cirklo. Tiamaniere al koincidaj aplikkorelacioj kaj al koincidaj retroaplikkorelacioj respondas respektive la formuloj



Tipa ekzemplo de paralela korelacio estas laŭ nia vidpunkto la korelacio subjekto-predikato, ekzemple en la frazo la knabo kuras:


6. la knabo kuras  $\leftrightarrow$



Tie ĉi la K-termo la knabo kaj la F-termo kuras estas la du komplementaj facetoj de sama kompleksa evento. Ili estas samrangaj kaj la ideo knabo kunligas kun la ideo kuro en tia kunfanditeco, ke ne estas eble privilegii unu super la alia, kiel okazas male en la segmento kuro de knabo, kie oni enfokusigas la ideon de kuro, aŭ en la segmento kuranta knabo, kie oni enfokusigas la ideon de knabo.

Similan samrangecon oni retrovas en la korelacio subjekto-objekto, kiun peras la transitiva verbo, ekzemple en la frazo la knabo manĝas pomon:


7. la knabo/manĝas/pomon  $\leftrightarrow$



Ankaŭ ĉi tie, malgraŭ ilia funkcia diverseco, la du substantivoj la knabo kaj pomo havas saman semantikan dignecon, tiel ke oni povas diri, ke pomo paralelas kun la knabo.

Malsimila estas kontraŭe la balanco en la korelacio subjekto-predikativo, kiun peras la kopulo esti kaj similaj verboj /iĝi, fariĝi, ŝajni k. t. p./. Ni prenu kiel ekzemplon la frazon la knabo estas gimnaziano. Al ĝi respondas laŭ nia starpunkto la jena kunfiguro de korelacioj:


8. la knabo /estas/ gimnaziano  $\leftrightarrow$




Tie ĉi la kontraŭstarantaj ideoj ne estas, kiel povus ŝajni unuavide, la knabo kaj gimnaziano, sed unuflanke la knabo kaj duflanke lia gimnazianeco, lia esto kiel gimnaziano. Laŭ ni, do, la rilato de egaleco, kiun peras la kopulo esti respegulas esence koindican korelacion: la subjekto koindicas kun la predikativo, ĉar du egaligitaj ideoj estas nepre en koincida konverĝo, ne en paralela kontraŭstaro.

En la senco de troviĝi, okazi k.t.p. la verbo esti kondukas alimaniere, kiel oni povas vidi en la korelaciaj kunfiguroj respondaj al la frazoj la gimnaziano estas en sia hejmo kaj la gimnaziano estas hejme:

9. la gimnaziano estas en sia hejmo  $\leftrightarrow$





La verbo esti ambaŭkaze, peras aplikan korelacian inter la subjekto kaj la loka komplemento. En /9/, dank' al la prepozicio en, la supreinsertita korelacio estas paralela /  $\Delta \text{---} \bigcirc$  /; dume en /10/ la supreinsertita korelacio estas koincida /  $\bigcirc \text{---} \Delta$  / kaŭze de la adverba finaĵo -e.

### 3. Korelacia sistemo

De tio, kion ni diris antaŭe, sekvas, ke la frazelementoj interrilatiĝas laŭ unu el la kvar ĵus menciitaj ĉefaj klasoj de korelacioj:

- 1/ paralelaj aplikkorelacioj /  $\Delta \rightarrow \bigcirc$  /,
- 2./ paralelaj retroaplikkorelacioj /  $\Delta \leftarrow \bigcirc$  /,
- 3./ koincidaj aplikkorelacioj /  $\bigcirc \leftarrow \Delta$  /,
- 4./ koincidaj retroaplikkorelacioj /  $\bigcirc \rightarrow \Delta$  /.

Estas oportune denove substreki la fakton, ke ĉiu el tiuj kvar korelaciaj klasoj rezultas el la sumo de du mensaj operacioj, pere de kiuj, sur intelekta antaŭlingva nivelo, semantike jam strukturitaj ideoj /la termoj de la korelacio/ estas kunaranĝataj paralele /  $\Delta \text{---} \bigcirc$  / aŭ koincide /  $\bigcirc \text{---} \Delta$  /, aplike /  $\Delta \rightarrow \bigcirc$  ;  $\bigcirc \leftarrow \Delta$  / aŭ retroaplike /  $\Delta \leftarrow \bigcirc$  ;  $\bigcirc \rightarrow \Delta$  /.

La ĵus donitaj ekzemploj de formalizo de la signifo de frazoj montris, kiamaniere unuopaj korelacioj organiziĝas en kompleksaj strukturoj de supre- kaj sub-insertitaj korelacioj /korelaciaj kunfiguroj/ kaj tradukiĝas en la

surfacaĵajn formojn de la lingvo. Kiam oni parolas, oni faras ĝuste tion. Oni organizas la ideojn kaj oni ilin projekcias sur la lingvan ebenon laŭ specifaj leksikonaj kaj sintaksaj reguloj, kiujn la lingva kompetenteco diktas. La aŭskultanto siavice perceptas la lingvajn formojn, ilin analizas, kaj, dank' al sia kompetenteco, provas rekonstrui la samajn kunfigurojn de ideokorelacioj, kiujn ellaboris la parolinto.

En tiu procedo estas evidenta la graveco de la rolo ludata de la korelaciindikiloj /prepozicioj, morfologiaj finaĵoj, konjunkcioj, subjunkcioj k.t.p./. Tial, por klasifiki la funkcion de la diversaj korelaciindikiloj ni proponas kvarangulan diagramon, aranĝitan laŭ du koordinatoj, nome la koordinato de la aplika-retroaplika alternativo kaj la koordinato de la paralela-koincida alternativo:

	koincidaj	paralelaj	
aplikaj	$\bigcirc \leftarrow \Delta$	$\Delta \rightarrow \bigcirc$	aplikaj
retro-aplikaj	$\bigcirc \rightarrow \Delta$	$\Delta \leftarrow \bigcirc$	retro-aplikaj
	koincidaj	paralelaj	

Tia krado estas formata de la interplekto de tri horizontaj bendoj kaj tri vertikalaj kolonoj. Ĉiu el ili entenas tri fakojn, tiel ke sume oni ricevas naŭ fakojn.

En la supra horizonta bendo ni distribuos la korelaciindikilojn, kiuj signalas aplikan korelacian. Tiujn, kiuj indikas koincidan aplikkorelacian, ni metas en la fakon markitan per la formulo  $\bigcirc \leftarrow \Delta$ ; dume tiujn, kiuj esprimas paralelean aplikkorelacian, ni metas en la fakon markitan



per la formulo  $\Delta \rightarrow \bigcirc$ . En la mezan fakon de la supra bendo ni metos fine la indikilojn de aplika korelacio, kiuj estas neŭtraj je la paralela-koincida alternativo.

Same, en la malsupra horizonta bendo ni distribuos la korelaciindikilojn, kiuj esprimas retroaplikan korelacian. Tiujn, kiuj indikas koincidan retroaplikkorelacian, ni metos en la fakon markitan per  $\bigcirc \rightarrow \Delta$ , kaj tiujn, kiuj indikas paralelan retroaplikkorelacian ni metas en la fakon markitan per  $\Delta \leftarrow \bigcirc$ . Denove, en la neokupitan mezan fakon ni metos la indikilojn de retroaplika korelacio, kiuj estas neŭtraj je la paralela-koincida alternativo.

Nun restas vaka nur la meza horizonta bendo. Tie, la mezan fakon de la maldekstra kolono ni destinas al la indikiloj de koincida korelacio, kiuj estas neŭtraj je la aplika-retroaplika alternativo. Oni povus tien meti ekzemple tiun sintagman korelaciindikilon, kiu estas la tipa sinsekvo de la radikaloj en kunmetitaj vortoj. Kiel konstate, en Esperanto la ĉefa radikalo, t.e. la K-termo de tia korelacio, venas post la epiteta radikalo, F-termo. Tiu ĉi radikalsinsekvo estas ja tute neŭtra je la aplika-retroaplika alternativo. La aŭskultanto/leganto decidas mem, ĉu kompreni la korelacian aplike aŭ retroaplike, sin apogante sur la specifa signifo de la radikaloj. Litvesto respegulas ekzemple aplikan koincidkorelacian  $\bigcirc \leftarrow \Delta$  /: ĝi estas vesto por enlitiĝi, nome esprimo, en kiu la ideo vesto aplikigas koincide al la ideo lito kaj tiamaniere determinigas. Male, kapvesto respegulas retroaplikan koincidkorelacian  $\bigcirc \rightarrow \Delta$  /: la ideo kapo aplikigas koincide al la ideo vesto kaj ĝin determinas. La koincideco de ambaŭ korelacioj konsistas ankaŭ el la fakto, ke litvesto povas ekzisti sen la koncerna lito, kaj kapvesto same sen la koncerna kapo.

Daŭrigante la ilustron de nia diagramo, la mezan fakon de la dekstra kolono ni asignos al la indikiloj de paralela korelacio, kiuj estas neŭtraj je la aplika-retroapli-

ka alternativo. Tien ni povus meti ekzemple la sintagman korelaciindikilon, kiu signalas apozicion kaj nomepiteton. Ambaŭkaze temas pri sintagmo formata de du substantivoj en paralela rilato, kies la unua rolas kiel K-termo kaj la dua kiel F-termo, ekzemple la rivero Nilo kaj Kartezio, la fama filozofo. Ankaŭ tie ĉi la vortordo neniel klarigas, ĉu la koncerna korelacio estas aplika aŭ retroaplika. Tamen, en la kazo de la rivero Nilo, oni facile komprenas, ke la ideo rivero aplikigas al Nilo  $\Delta \rightarrow \bigcirc$  /; dume en la dua kazo, oni tuj ekvidas ke la ideo fama franca filozofo aplikigas al Kartezio  $\Delta \leftarrow \bigcirc$  /.

La centra fako de la krado devus resti vaka. Tamen en Esperanto la finaĵo -e povas funkcii kiel indikilo de tiel diversaj korelacioj, ke ĝi ŝajnas taŭga por okupi tiun fakon. De la semantika naturo de ambaŭ termoj de la korelacio la aŭskultanto/leganto malkaŝas mem la koncernan tipon de korelacio, pri kiu temas; vidu ekzemple estas varme, li fine decidis, ĝi falos teren, promenante sur la strato, mi glitis  $\bigcirc \leftarrow \Delta$  /; li kuras rapide, detale ekzameni, trovinte pomon, mi ĝin mangiis  $\bigcirc \rightarrow \Delta$  /; paroli maĉante ĉiklon, vagi gapante, rifuzi kapskuante  $\Delta \leftarrow \bigcirc$  /.

#### 4. Prepozicia sistemo

Ni vidu nun, kiamaniere ni povas distribui en tiu ĉi krado la 34 prepoziciojn de Esperanto, kaj kia prepozicia sistemo rezultas el tiu distribuo.

Laŭ nia starpunkto, 2o el la 34 prepozicioj de Esperanto disdividiĝas kvinope en kvar simetriaajn grupojn kaj ĉiu kvinopo da prepozicioj specialiĝas ekskluzive en la esprimo de unu el la kvar ĉefaj korelaciaj klasoj.

Kvin prepozicioj, nome AL, JE, ĈE, PRO kaj ĜIS apartenas al la fako de la indikiloj de koincidaj aplikkorelacioj  $\bigcirc \leftarrow \Delta$  /. Ni ilin nomos koincidadplikaj prepozicioj.

Responde al ili, en la fako de la indikiloj de paralelaj aplikkorelacioj /  $\Delta \rightarrow \bigcirc$  /, situas kvin aliaj prepozicioj, nome EN, SUR, DUM, TRA kaj INTER. Ni ilin nomos paralelaj aplikaj prepozicioj.

Simetrie, en la fako de la indikiloj de koincidaj retroaplikkorelacioj /  $\bigcirc \rightarrow \Delta$  /, situas aliaj kvin prepozicioj, nome DE, DA, EL, PRI, OL. Ni ilin nomos koincidaj retroaplikaj prepozicioj.

Fine, ankoraŭ kvin prepozicioj, nome KUN, SEN, PER, LAŬ kaj APUD okupas la fakon de la indikiloj de paralelaj retroaplikkorelacioj /  $\Delta \leftarrow \bigcirc$  / . Ni ilin nomos paralelaj retroaplikaj prepozicioj.

Rezultas do, ke 20 el la 34 prepozicioj de Esperanto distribuigas laŭ la jene maniero:

	koincidaj			parelelaj		
aplikaj	AL <sup>^</sup> CE PRO	JE <sup>^</sup> GIS		EN DUM SUR	TRA INTER	aplikaj
retro-aplikaj	DE PRI EL	DA OL		KUN PER SEN	LAŬ APUD	retro-aplikaj
	koincidaj			parelaj		

La ceteraj 14 prepozicioj de Esperanto trovas sian lokon en la meza kolono de la diagramo, ĉu en la fako de la korelaciindikiloj kapablaj esprimi nur la kategorion de

aplikeco, ĉu en la fako de la korelaciindikiloj, kapablaj esprimi nur la kategorion de retroaplikeco.

Al la supra meza fako apartenas laŭ ni 7 prepozicioj, nome POR, ANTAŬ, KONTRAŬ, SUPER, ĈIRKAŬ, PRETER kaj TRANS. Ni ilin simple nomos aplikaj prepozicioj. La restantaj 7 prepozicioj, nome POST, SUB, MALANTAŬ, KROM, EKSTER, ANSTATAŬ kaj MALGRAŬ, apartenas sekve al la malsupra meza fako kaj nomiĝos simple retroaplikaj prepozicioj.

Kompletiĝas tiel bildo de la prepozicia sistemo de Esperanto, kŭe ĉiu konsistiga elemento okupas la lokon respondantan al la tipo de idekorelacio, kiun ĝi kapablas signali. La citordo de la diversaj prepozicioj interne de la sama fako estas tute hazarda, ĉar ne estas eble - ni almenaŭ ne kapablas - disdividi la fakojn en simetrie egalajn subfakojn laŭ iu ajn plua kriterio kaj enmeti en ilin unuopajn prepoziciojn.

#### LA PREPOZICIA SISTEMO DE ESPERANTO

	koincidaj			parelaj			
aplikaj	AL <sup>^</sup> CE PRO	JE <sup>^</sup> GIS		POR KONTRAŬ PRETER	SUPER ĈIRKAŬ TRANS	EN TRA DUM INTER	aplikaj
retro-aplikaj	DE PRI EL	DA OL		SUB KROM ANSTATAŬ	POST EKSTER MALGRAŬ	MALANTAŬ PER APUD	retro-aplikaj

Temas pri aparte simetria sistemo, kies cefaj trajtoj estas la vakeco de la meza bendo kaj la koncentriĝo de la plej konkretaj prepozicioj en la meza kolono.